Theodor Storm,

# En la arbaro

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Ĉi tie ĉe l' deklivo
Mutiĝas nun la vent',
Kaj sidas sub la branĉoj
Infano en silent'.

En timian-odoro
Ŝi sidas sur la ter';
La bluaj muŝoj zumas
Kaj brilas tra l' aer'.

Silentas la arbaro,
Rigardas saĝe ŝi,
Kaj ĉirkaŭ la harbukloj
Fluadas sun-radi'.

Kukolo ridas fore;
Pensigas io min:
Ŝi havas la okulojn
De la arbar-reĝin'.

*Traduko de la Germana poemo "Im Walde" de* Theodor Storm *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

*Arg-172-344 (2004-02-22 11:32:56)*